Kiel pereis la familio de D-ro L. Zamenhof.

Magistro Isaj Dratwer

N. B., La interkrampigitaj partoj estas ellasitaj pro la limigita spaco.

Parolas magistro Isaj Dratwer, bakteriologo, prezidanto de Esperanto-Ligo Israela kaj komitatano de UEA.

Plej kore mi salutas en la nomo de israela esperantistaro kaj en mia propra la japanajn esperantajn geamikojn kaj gesamideanojn en la tuta mondo.

Mi naskiĝis en Varsovio—Polujo, tie mi pasigis multajn jarojn, finis gimnazion kaj universitaton kaj dum longa tempo estis tre aktiva en la pola esperanta movado. Por la esperanta agado, kiel la unua esperantisto en Polujo mi ricevis de la Ŝtatkonsilantaro de Pola Popola Respubliko altan ŝtatan ordenon "La Ora Kruco de Merito".

Mi loĝis en Varsovio dum ĝia sieĝo dum la dua mondmilito, troviĝis en la varsovia getto ek de ĝia fondo ĝis la definitiva likvido. Tial mi povas rakonti pri sorto de la familio de doktoro Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto.

〔Ĉar lastatempe aperis en diversaj esperantaj gazetoj ne ĝustaj, eĉ falsaj informoj pri sorto de la familio de la kreinto de Esperanto mi volas prezenti la veron! Anticipa rimarko: mi loĝis en Varsovio dum la sieĝo, troviĝis en la varsovia getto ek de ĝia fondiĝo ĝis la definitiva likvido. La historiaj faktoj estas necesaj por pli bone kompreni la estiĝintan situacion.〕

Dum la sieĝo de Varsovio en septembro 1939 estis detruita fare de germanaj aviadiloj la domo ĉe strato Królewska 41, kie sur la 3-a etaĝo troviĝis la loĝejo de doktoro Ludoviko Zamenhof. Post lia morto en la vasta kvinĉambra apartamento loĝis doktoro Adamo, lia edzino doktorino Wanda kun la filo Ludoviko ankaŭ doktorino Zofia kaj magistrino Lidja, la filinoj de Zamenhof. En la loĝejo estis pie konservataj diversaj memoraĵoj pri la kreinto de la lingvo internacia. Ankaŭ lia kabineto, en kiu li kutimis labori, restis preskaŭ senŝanĝa. Post la detruo de la domo, la familio de Zamenhof ekloĝis en loĝejo de gesinjoroj Minc, doktorino Janina estas fratino de s-ino Wanda, ĉe strato Foch 8.

Kelkajn tagojn post okupo de germanoj de Varsovio (28. IX. 1939) vizitis min hejme S-no Julian Lindenszat, aktivulo de la esperantista societo "Konkordo", kiu poste pereis

kun miloj da aliaj judaj gesamideanoj, kaj emociita informis, ke la tuta familio de doktoro Zamenhof estas arestita. Li ankaŭ konsilis al mi, ke mi detruu miajn esperantajn librojn kaj fuĝu el la hejmo, ĉar verŝajne oni ankaŭ arestos min. Mi ja estis prezidanto de la plej vigla esperanta organizaĵo "Varsovia Esperantista Societo". Tamen mi ne bruligis miajn esperantajn librojn ili poste pereis kune kun mia tuta havaĵo dum la likvido de la varsovia getto kaj restis hejme...

Kiel poste mi eksciis, la aŭtoritatoj de la sieĝata kaj multe suferanta Varsovio sukcesis bruligi adresojn de estraranoj de ĉiuj societoj kaj politikaj organizaĵoj, agintaj antaŭ la milito en la ĉefurbo de Polujo.

Evidentiĝis, ke la germanoj arestis la filon de doktoro Zamenhof doktoron Adamon, kiu estis ĉefkuracisto de la Oftalmologia Fako en la Juda Hospitalo kaj post eksplodo de la milito, pro forkuro de la antaŭa direktoro, fariĝis direktoro de la hospitalo. Oni arestis lin en la Flegistina Lernejo, troviĝanta sur tereno de la hospitalo, kie estis disponigita por li ĉambro. Kiel rakontis al mi atestantino—instruistino de la lernejo, venis gestapanoj, ŝi eĉ supozas, ke ili portis kuracistajn uniformojn kaj demandis pri doktoro Adamo Zamenhof, direktoro de la hospitalo. Ili demandis pri li en germana lingvo kaj ies asertoj, ke la arestintoj parolis Esperanton, estas malveraj. Post kelkminuta estado en lia ĉambro ili forlasis ĝin kune kun Adamo Zamenhof, kiu estis tre pala. La saman tagon en la hospitalo oni arestis lian edzinon doktorinon Wandan kaj fratinon doktorinon Zofian. En la hejmo de gesinjoroj Minc, la saman tagon, la germanoj arestis fraŭlinon Lidjan kaj doktoron Henrikon Minc, bofraton de Wanda, kiu tute ne estis esperantisto. Lin oni prenis anstataŭ Ludoviko, tiam malsana, supozinte verŝajne, ke la knabo havas tifon.

La arestitajn virinojn oni ellasis post la kelksemajna malliberigo en la porvirina malliberejo nomita "Serbia"

(Dum tiu tempo kelkfoje mi renkontiĝis kun s-ro Jean Forge (Jan Fethke), kiu tiam estis grava funkciulo en la hitlera administrado (ĉefo de la kultura fako) kaj direktoro de reklamoficejo "Tempo", petante intervenon por la filo de la kreinto de Esperanto kaj lia bofrato. Mi vizitis kelkfoje s-ron Jean Forge (Jan Fethke) en lia oficejo ĉe strato Chmielna 47 (49?) kaj unu fojon li invitis min al la kafejo ĉe la sama strato. En fenestroj de la kafejo pendis ŝildetoj "al judoj eniro malpermesita", sed s-ro Forge (Fethke) asertis, ke kun li mi povas eniri senĝene. Li promesis interveni, sed ĉu li malsukcesis aŭ entute ne intervenis, tion mi ne scias.)

Ek de januaro 1940 doktoroj Adamo Zamenhof kaj Henriko Minc ne plu troviĝis en la varsovia malliberejo Pavjak. Laŭ iuj nekontrolitaj onidiroj, poste ili troviĝis en la germana koncentrejo Stutthof. Precizaj ĉirkonstancoj kaj dato de ilia morto ne estas konataj. Ĉu la germanoj ilin mortpafis aŭ bruligis en kremaciejo aŭ sufokis en gaskamero ne estas grave. La rezulto ja estas la sama ! ...

La germanoj, tuj post okupo de Polujo kaj Varsovio, komencis persekuti la civilan loĝantaron, precipe la judan. Jam en novembro 1939 ĉiuj judoj, plenkreskuloj kaj infanoj, devis porti specialan insignon.

(en la tiel nomita Ĝenerala Gubernio blankan bendon kun blua sespinta stelo sur la dekstra mano kaj en la urboj alligitaj al "Reich" - sespintan flavan stelon sur la brusto kaj dorso).

La situacio de la judoj ĉiam pli malboniĝis. En novembro 1940 en Varsovio estis fondita getto, ĉirkaŭita de altaj muroj kun pikdrato supre. En la fermitan kaj severe gardatan ne tro grandan spacon oni enŝtopis pli ol 400.000 judojn el Varsovio kaj ĉirkaŭajoj. La vivkondiĉoj estis teruraj. Regis malsato, malsanoj. En la getto troviĝis ankaŭ la restintaj membroj de la familio de Zamenhof. Wanda kaj Zofia laboris kiel kuracistinoj, Lidja instruis la anglan lingvon.

En julio 1942 la germanoj komencis ekstermadon de la judoj loĝantaj en la getto. Apud ĝia limo troviĝis iamaj magazenoj de la Unuiĝo de Polaj Kooperativoj, al kiuj kondukis flankaj relvojoj. La germanoj eluzis tiun ĉi placon kaj aranĝis tie "Umschlagplatz" kien perforte oni trenis la kaptitajn judojn, virinojn, maljunulojn, infanojn, malsanulojn kaj de "Umschlagplatz" unu fojon, kaj poste dufoje dum tago per specialaj porbestaj vagonaroj, oni veturigis ĉiujn viktimojn al Treblinka, kie en 10 gaskameroj la germanoj murdis ĉ. milionon da judoj; en Oswiecim-Auschwitz ili murdis ĉ. tri milionojn da judoj kaj unu milionon da nejudoj, du milionojn da judoj pereis en la mortigejoj Majdanek, Sobibör, Betzec kaj aliaj.

(Ĝuste pravas f-ino M. Boulton, sed ne f-ino Noll - vidu "Dansk Esperanto-Blade" n-ro 12/1963 kaj "Germanan Esperanto-Revuon" n-ro 2/1964. En gasveturiloj la germanoj murdis judojn el urbo Chetm kaj ĉirkaŭajoj - vidu interalie la valoregan verkon de la konata pola verkistino Zofia Nakkowska "Medalionoj" en esperanta traduko - sed evidentiĝis, ke la "produktado" estas tre malgranda konforme al la "bezono"...)

Tiamaniere pereis Zofia kaj Lidia. Wanda kun Ludoviko sukcesis sin savi en kuracsitaj kiteloj de "Umschlagplatz". — tiam ankoraŭ tio estis ebla — kaj poste kaŝis sin sub la nomo Zaleska.

〔Pri la kortuŝa historio, pri kiu rakontis f-ino Noll, mi nenion aŭdis kaj laŭ mia scio doktorino Wanda Zamenhof post la milito ne estis en Kopenhago. Kun ŝi mi renkontiĝis ofte!〕

En januaro 1943 okazis dua likvido de la varsovia getto kaj en aprilo de la sama jaro la lasta, dum kiu okazis la imponega ribelo de la juda junularo nemultnombra kontraŭ la potenca germana militmaŝino. La getto en Varsovio estis ebenigita kun la tero!...

Kaj kio koncernas min, la rakontinton de tiu ĉi eble seka, sed vera raporto, do, mi perdis ĉiujn miajn proksimulojn, la germanoj prenis min el la brulanta domo en la getto la 27-an de aprilo 1943, ial ne mortpafis min, kiel la aliajn, kaj du jarojn mi pasigis en germanaj koncentrejoj. Usonaj milittrupoj liberigis min la 23-an de aprilo 1945 dum la evakuada marŝo el la koncentrejo Flossenburg en la arbaro ne malproksime de urbeto Stamsried (Bavarujo)...